n-ro 32

Oktobro 1990

**I**nternacia **K**omerca kaj **E**konomia **F**akgrupo

# La Merkato

**Komerca Terminaro kun Esperanta Indekso**
IKEF ankoraŭ disponas pri la *Proveldono de la Komerca Terminaro* (KomTo) kun *Esperanta Indekso*. Ili estu utilaj helpiloj. La terminaro kostas favorpreze: 450 belgaj frankoj (aŭ ties egalvaloro). Sendu vian pagon al unu el la kontoj menciataj sur la dua paĝo (ĉe "Kontoj:")

---

**La plej grava informo ĉi foje:**

> **Legu pri la IKEF-Seminario sur paĝo 10 ĉi ene! 31a de majo - 2a de junio 1991.**

---

## Enhavo:


Estraro, sidejoj, kotizoj, kontoj kaj perantoj ............ 2
Saluton ........................................ dk ........... 3
Rezultoj de la estrarelektoj ................... FXG/dk ....... 4
La statuto de IKEF estu ŝanĝota ......... dk ........... 4
La nova Identecŝildaro pretiĝis ......... FXG/RR ....... 4
Nova informfolio pri IKEF nun pretas ........ dk ........... 4
Reago al "KION FARI ?" ...................... Piegat/dk .... 4
Vitraĵoj el Ĉinio ......................... Koralo/dk .... 5
Agrikulturaj produktoj el Vjetnamio ......... dk ........... 6
Libera ĵurnalo en USSR ..................... Nikonov/dk ... 6
Nova firmao en Bulgario ..................... Angelov/dk ... 6
Komercema Grupo Yema, Hainan, Ĉinio ...... dk ........... 6
Internacia Koresponda Lingvokurso ........... dk ........... 7
Kemiaj kaj bakteriaj analizoj ............... dk ........... 7
Diversaĵoj ................................ dk ........... 7
3-a Internacia Ekonomikista Simposio ........ Gether ....... 8
IKEF-Seminario en KCE 1991 .................. dk .......... 10
Bonvenon; Peranto (Hispanio); Reklamtarifoj . dk .......... 12

La Merkato (LM) estas organo de **IKEF**; ĝi aperas kvaronjare kaj servas al la membraro kiel komuna komunikilo.

La Estraro de IKEF: S-ro Franz Josef **Braun** (FJB), Prezidanto kaj Generala Sekretario; S-ro Roland **Rotsaert** (RR), Financa Konsilanto; D-ro István **Gether**; S-ro François-Xavier **Gilbert** (FXG); D-ro Marco **Picasso**; S-ro Seikô **Yamasaki**; S-ro Daniel **Kōnig** (dk).
Revizoro por la financa raporto: D-ro Gianfranco **Polerani**.

**Centra sidejo**:
Ce s-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8,
D-7580 Bühl 16, FR Germanio

**Financa sidejo kaj membro-administrado**:
Ce s-ro Roland **Rotsaert**, Visspaanstraat 97,
B-8000 Brugge, Belgio, *telefono:* +32.(0)50.330004

**Redaktora sidejo**:
Ce s-ro Daniel **Kōnig**, Schwarzwaldstraße 47
D-6800 Mannheim 1, FR Germanio, *telefono:* +49.(0)621.821710

La jara **membrokotizo** estas 400 belgaj frankoj, 20 nederlandaj guldenoj, 20 germanaj markoj aŭ 10 usonaj dolaroj. Ciuj, kiuj intencas kunlabori por subteni la klopodojn apliki Esperanton en komerco kaj ekonomio estas invitataj iĝi IKEF-ano. Dumviva membreco akireblas pere de unufoja egalvalora pago de la 20-obla membrokotizo.
**Kontoj**: Ce UEA kaj ĉe FEL, kodo ikef-c,
*aŭ* ĉe Belga poŝtĉekkonto, Bruselo n-ro 000-1592629-83,
je la nomo de **IKEF**, p.a. S-ro Roland **Rotsaert**.

**Perantoj**:
***Francio***: S-ro François-Xavier **Gilbert**, Vert Coteau,
F-55000 Longeville en Barrois, (CCP 1275-89 L Nancy)
***FR Germanio***: S-ro Franz Josef **Braun**, Hornisgrindestraße 8,
D-7580 Bühl 16, (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400)
***Hungario***: D-ro István **Gether**,
Berényi ul.8 I/6, H-1027 Budapest
***Italio***: D-ro Marco **Picasso**,
via de Gasperi 7, I-20057 Vedano al Lambro
***Japanio***: S-ro **Seikô Yamasaki**,
185 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12,
(Poŝtĝirkonto, n-ro 6-253232; Kotizo: 1400 enoj)
***Jugoslavio***: S-ro Sotir **Taleski**,
ul. 'Oslo'br. 12, YU-91000 Skopje
***Svislando***: S-ro André **Piérard**, Chemin des Voirambeys,
CH-3974 Mollens, (Poŝtĉekkonto, n-ro 19-33545-3)
***Togolando***: S-ro Gbeglo **Koffi**,
B. P. 13169, Nyékonakpoé, Lomé



## Saluton

Estimataj gesinjoroj,
karaj gelegantoj,

La mondo moviĝas - la movado atendas.
Jaron post jaro - la tempo pasas.

Kun granda ĝojo mi rimarkas ke la intereso kaj reagemo de la legantaro kreskas. Denove sin anoncis pluraj kun koncernaj komercdeziroj el diversaj landoj.

Kiu el inter ni gajnis jam ion per Esperanto? S-ro **Piegat** tute ĝustas per sia opinio ke ni parolas, skribas, celas, provas kaj planas...; tre agnoskinde, bedaŭrinde kun mala efiko. Neniu (escepte de s-ro **Braun**) rakontis al mi nek fojan nek regulan komercan sukceson pere de Esperanto. Tre malmultaj el inter ni havas krom iu profesia rilato al komerco kaj hazarda emo uzi Esperanto ankaŭ la bezonon de internacia komunikado flanke de la respektiva profesio.

Intruu min veron, se mi malvere skribas.

Internacie komuniki, kaj profesie kaj komerce, plej parte nur eksportistoj kaj importistoj bezonas kaj faras. Tial mi ege petas raporteton/sciigon de vi, se vi lertas, aŭ eĉ nur iam spertis la farendan.

Ni ĉiuj estas tro mal-per-ema. Etajn artikoletojn ĉi-foje enhavas la LM, informojn el ofertaj leteroj. Ni dubu pri la hazardo, ĉu iu bezonas kaj emas importi legomojn, arakidojn el Bulgario aŭ teksaĵojn el Cinio. Kaj, neniu miascie ĝis nuntempe petis pri aperigo de serĉ-letero, do aĉetoferton.

Ciukaze: "vero ne estas teoria". Ju pli konkrete viaj leteroj esprimas viajn komerc-dezirojn, des pli bone kaj des pli verŝajne estos la reago de iu interesoto.

Agrablan legadon deziras

Daniel König
/dk

## Rezultoj de la estrarelektoj

S-ro François-Xavier **Gilbert** kolektis la voĉojn donitajn, estis 27 entute (po elektenda persono). Inter tiuj respondintoj trovis

24 voĉoj por la reelekto de s-ro d-ro Marco **Picasso** kaj

26 voĉoj por la reelekto de nia prezidanto kaj ĝenerala sekretario s-ro Franz Josef **Braun**.

Ni konstatas: ambaŭ estas reelektitaj; gratulon!

/FXG/dk

## La statuto de IKEF estu ŝanĝota

Laŭ propono de S-ro Seikô **Yamasaki**, Japanio, ni ŝanĝu la statuto de IKEF jene, ke la estraro ne plu estu elektata dum jarĉefkunvenoj okaze de Universalaj Kongresoj de UEA, sed ĉiam ni okazigu perpoŝtan voĉdonadon.

La tuta membraro nun estas alvokita laŭokaze esprimi kromajn ŝanĝdezirojn rilate al nia statutoj.

/dk

## La nova Identecŝildaro pretiĝis

Krom detalaj informoj pri 49 IKEF-membroj, ankaŭ enestas la kompleta IKEF-adresaro

Prezo (inkluzive de afranko):

1 ekzemplero: 150 belgaj frankoj
2a ĝis 4a plia ekzemplero: 100 belgaj frankoj
ekde 5 ekzempleroj: po 100 belgaj frankoj

Vidu la IKEF-kontonumeron en La Merkato, paĝo du.

Principe, la menditaj Identecŝildaroj estos sendataj kune kun La Merkato. Se vi deziras, ni ankaŭ povas sendi la de vi mendita(j)n ekzemplero(j)n kun viaj salutoj al konatuloj viaj.

/FXG/RR

## Nova informfolio pri IKEF nun pretas

La Nova informfolio de IKEF prezentas la celojn de IKEF, ĝiajn originon kaj realigojn. Tiu verda papero stokas por vi, mendu ĝin ĉe
s-ro Roland **Rotsaert**, Brugge, Belgio.

/dk

## Reago al "KION FARI ?" (LM 31, paĝo 6-7)

S-ro Maciej **Piegat**, (IKEF 110), [Dantego 1B/48, PL-01 914 Varsovio, Pollando] - ankaŭ li nuntempe membriĝis - skribis:

"Mi pensas ke unue oni devas respondi la demandon, ĉu ni volas profiti de ŝancoj, kiujn donas la ŝanĝoj en Eŭropo?



Mia respondo estas kompreneble 'jes' - neniam antaŭe la ideo de eŭropa komuna hejmo estis tiel proksima al realigo. Se dum la sekvontaj jaroj ni ne konvinkos neesperantistoj, ke Esperanto povas esti plenvalora komerclingvo - ni perdos ĉion." ...

... "nia nuna tasko ne estas partopreni en la akademiaj kvereloj ĉu eblas uzi "kurta" anstataŭ "mallonga" - nia tasko estas kunlabori, komerci, kunprodukti, ŝanĝi spertojn." ...

"Mi konsentas kun Sinjoro Gilbert, kiu skribis pri la dekoj de etaj ambaŭflanke profitedonaj ekonomiaj rilatoj. Nur per ekonomia sukceso ni montros ke Esperanto estas vere facile lernebla pont-lingvo.

La amikoj, kun kiuj mi parolas pri Esperanto, fine diras: 'bone, sed montru al mi almenaŭ unu moneron, kiun vi gajnis pere de Esperanto' kaj foriras studi libron 'Business English' aŭ 'Deutsch für Anfänger'.

Kompreneble naskiĝas la demando, ĉu tiamaniere ni ne perdos la Esperantan etoson, amikecon, helpemon ... - mi pensas ke ne, mi pensas ke eblas gardi tion aldonante ankaŭ la kontentigon de komercaj transakcioj." ...

"Varsovio 90 09 25 kun sinceraj salutoj *Piegat*"

/dk

## Vitraĵoj el Ĉinio

S-ro **Koralo**, direktoro de la 'Transmara Merkata Departemento de la Ĉina Suda Glasa Kompanio Ltd.', sendis tre interesan leteron. La firmao ofertas multspecajn vitraĵojn, ekzemple spegulojn kun klara/bronza/grisa koloro, vitrojn por fenestroj aŭ kiel tablo-supraĵoj, des pli gravuradon laŭ deziroj de la klientoj. La teknika ekipaĵo de la kompanio estas de PPG. (U. S. A.), CNUD. (Belgio), TAMGLASS (Finlando), BAVONONI, BOTTERO, BOUVORNE (Italio). Krom detala listo de la produkt-programo (ĉi tie ne menciata) li skribas: "Vi povas vidi niajn produktaĵojn en multaj landoj ekzemple en U.S.A. , Kanado, Aŭstralio, Mez-oriento kaj landoj en Azio, ktp... Ni povas provizi subajn produktaĵojn je tre konkurpova prezo." Pliaj informoj vi laŭbezone petu ĉe

s-ro **Koralo**, Overseas Marketing Dept. of
CHINA SOUTHERN GLASS CO. LTD.
Shekou Industrial Zone, Shenzhen,
518067, P. R. CHINA

Telefono: (0755) 695970
Telex: 420804 Fax: (0755) 692755

/dk

**Agrikulturaj produktoj el Vjetnamio**

Nia nova membro, s-ro Vu **Hong Tam**, (IKEF 111), [466/57A Le Van Si, P14 Q3 TP Hochiminh, Vietnam/Vjetnamio] esprimis sian emon konatiĝi ĉiujn esperantistojn de nia grupo.

Volonte li organizos eksportadon de sialandaj produktoj, precipe agrikulturaj produktoj ĉefe rizo.

Li pensas ke li sukcesos kontentigi ĉiujn grupanojn, kiuj intencos realigi komercajn kontraktojn en Vjetnamio pri kiu ajn enhavo. (el la de Vu **Hong Tam** de la 14a de sept. 1990)

/dk

**Libera ĵurnalo en USSR**

S-ro Sergej **Nikonov**, nin informis perletere:

"Nia lando tra la diversaj obstakloj iras al libera merkato. Preskaŭ ĉiun semajnon aperas novaj leĝoj, kiuj pli kaj pli etendas privatan entreprenadon. Vi verŝajne jam scias, ke nia lando havas praktike senliman merkaton. Sed rublo ne estas konvertebla. Dume mi opinias, ke nur komunaj entreprenoj okazos pli vivkapablaj. ... Mi kun amiko fondis liberan ĵurnalon. Dume nia ĵurnalo aperigas en rusa, estona kaj eperanta lingvo. Sed post iom da tempo ĝi enhavos suplementon germanlingva. En ĉi tiu ĵurnalo, krom ekonomiaj novaĵoj el nia lando estos anoncoj kun proponoj pri kontribuado, pri merkato. ... Mi atendas vian opinion kaj proponojn pri mia intenco.
Estime'

*Sergej Nikonov*
202020, Kohtla-Järve, p. k. 34., USSR

/dk

**Nova firmao en Bulgario**

S-roj Jordan **Jordanov** kaj Jordan **Angelov** sciigas al ni la fondiĝo de nova firmao pri produktado de legomoj, arakidoj, komerco de diversaj varoj, turismo enlanda kaj eksterlanda kaj speciale per uzado de Esperanto. Ili intencas interesigi nin aŭ niajn konatulojn kaj firmaojn por kunlaboro. Laŭdire la kondiĉoj estas favoraj. "La utilo estos granda por ambaŭ flankoj." Interesitoj sin turnu al: S-ro Jordan **Angelov**, P. K. 548, 4000 Plovdiv, Bulgario.

/dk

**Komercema Esperanto-Grupo Yema, Hainan, Ĉinio**

S-ro Cai Uei, [570003, N-ro 58, Strato Haifu, Feijang Kompanio, Haikou, P. R. Ĉinio] vicprezidanto de la



Esperanto-Asocio en Provinco Hainan kaj vicdirektoro de Feijang Kompanio, forte esprimis la volon kaj esperon tutmonde kunlabori kun komercistoj kaj esperantistoj. Li estas ano de la komercema Grupo Yema (Hainan) pri kies fondiĝo ni jam informis (LM 29, paĝo 12).

/dk

**Internacia Koresponda Lingvokurso**

Se vi havas malmulte da tempo, se vi ne povas viziti lingvokurson kaj se vi mem volas difini vian rapidecon en la lernado, tiam partoprenu la **Internacian Korespondan Lingvokurson** por progresantoj. La partoprenkotizo diferencas laŭ la jara nacia enspezo. Pliaj informoj ĉe Hungara Esperanto-Asocio, H-1369 Budapest, Pf. 193

/dk

**Kemiaj kaj bakteriaj analizoj**

Privata societo en Afriko ofertas kemiajn kaj bakteriajn analizojn. Jam laboras surloke kaj nun serĉas eksterlandajn komisiojn aparte. Interesatoj sin turnu al **Laboratoire d' Analyses Chimiques et Bactériologiques (LACB), 06 BP 95 ABIDJAN 06, Tel: 43 90 00 poste 3048; 43 24 82; 43 22 37.**

La informo venis pere de s-ro Gilles **Wallez** [BP 152 CIDEX III, ABIDJAN-RIVIERA, Côte d'Ivoire, Ebura Bordo], kiu laboras aktuale, kiel franca kunaganto, en Ebura Bordo, Afriko. Li petas laŭbezonan agnoskon de tiu oferto; ĝi servu al la apliko de Esperanto. /dk

## Diversaĵoj

La **kongreso de IFEF** (Internacia Fervojista Esperanto Asocio) okazos de la 11a ĝis la 17a de Majo 1991 en Brno. Informojn ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 01 PRAHA !. /RR

Homoj! Aĉetu la Komercan Terminaron. Tiuj, kiuj jam faris, sed ankoraŭ ne ricevis la indekson por la *Proveldono de Komerca Terminaro* (KomTo) sin turnu al s-ro **Rotsaert**, Brugge, Belgio. /dk

## 3-a INTERNACIA EKONOMIKISTA SIMPOSIO, BUDAPEŜTO JANUARO 1990

IKEF- prezidanto vizitis Budapeŝton
INTERNACIA KONFERENCO - EKOTRANS
En la Budapeŝta Ekonomika Universitato du internaciaj aranĝoj okazis fine de januaro. La ĉefa evento estis EKOTRANS, kies slogano estis "POR LA MEDIOAMIKA TRAFIKO". La aranĝon financis fondaĵo TALENTO, al kiu kontribuis grandparte EKOESP, la grupo de hungaraj esperantistaj ekonomkistoj.
Dum la tritaga konferenco la auskultantaro audis 72 prelegojn en tri lingvoj. angla, ESPERANTO kaj hungara. Pere de interpreta sistemo ĉiuj prelegoj estis sekveblaj en tri lingvoj. La averaĝa nombro de la auskultantoj estas ĉirkau 70. Multaj ĵurnalistoj partoprenis la aranĝon kaj preskau ĉiuj landaj gazetoj raportis pri la konferenco. Ankau la nacia televido montris bildojn pri la malfermo.
Inter la prelegoj la sekvaj estis en Esperanto:

D-ro So Gilsu (Korea Ekonomihistoria Instituto)
Trafiko en Sud-Koreo
Stefan MacGILL (Novzelando, redaktoro)
Du proponoj por plibonigi la budapeŝtan publikan trafikon
Franz Josef BRAUN (Bosch, sekciestro)
Instrumentoj malpliigantaj la mediajn damaĝojn de la motorveturiloj
Andras LUKACS (Fondaĵo TALENTO, kuratoria sekretario)
Kostoj de la automobilismo en Hungario
Maire MULLARNEY (Irlanda Verda Partio, prezidanto)
Pri la veturigo de infanoj - lau irlanda spertoj
Stefan MacGILL (Novzelando, redaktoro)
Propono pri ŝanĝo de la MAV- horaro
Lev MEDVEDEV (Sovetunio, ekologo, scienca konsilanto)
Medioprotektado en Sovetunio
D-ro Arpad MATHE (Universitato ELTE Kemia Teknologia katedro, adjunkto)
Interrilato de aermalpurigo kaj kemia teknologio

## INTERNACIA EKONOMIKISTA SIMPOSIO

Kadre de EKOTRANS okazis la 3-a IES dimanĉe matene.
Unue profesoro So Gilsu prelegis. La titolo de lia prelego estis:



Kio evoluigis la korean ekonomion?
Komence de la Prelego li parolis ĝenerale pri la ekonomia evoluo, pri la ŝanĝiĝo de la strukturo ekonomia. En la ĉapitro pri la faktoroj de la ekonomia evoluo en Koreo li vicigis la jenajn:
-utiligo de altkvalita laborforto
-altnivela direktado kaj administrado de la ekonomio
-alta kultura nivelo
-granda entuziasmo pri edukado
-invada minaco de Norda Koreo.
Fine li parolis pri la karaktero de la korea popolo. Antau IES profesoro So prelegis pri la sama temo por la profesoroj de la ekonomia Universitato. Jozsef HORVATH, peranto de IKEF el Hungario, profesoro de la universitato, organizis la sukcesan prelegon. Kaj kiel malgranda estas la mondo. Kiam post la unua prelego kun profesoro So ni kune estis elirantaj el la universitato li renkontis du samlandajn profesorojn de fama seula universitato. Antaue hejme ili neniam renkontiĝis. D-ro So akiris multajn informojn pri la hungara ekonomio dum sia restado kaj donis tre profundan kritikon pri ĝi.
La dua preleganto estis S.ro Franz Josef BRAUN, nia prezidanto. La titolo de lia prelego estis:
Moderna materialmastrumado en grandseria industrio.
Li menciis du fenomenojn:
1. Ju pli alte evoluinta estas iu industrio des pli malalta estas sia produktada profundeco. Tio signifas, ke oni ne fabrikas la diversajn partojn si mem, sed aĉetas ilin.
2. Koncerne la grandajn firmaojn la tendenco signifas pli kaj pli aĉetadon ol propran fabrikadon.
Firmao BOSCH ekzemple pli ol duobligis sian vendosumon dum dek jaroj, dumtempe la nombro de la dungitoj kreskis nur 19 pocentojn.
Li detaligis la karakterizojn de la moderna materialmastrumado en 11 punktoj. Li aldonis ankau bildojn por ilustri la diritojn.
Post la du prelegoj estis diskuto. La aranĝo pruvis, ke ĉiu iniciato valoras.
Se iu leganto de MERKATO interesiĝas pri la prelegoj, bonvolu peti kopion au el Budapeŝto au de la prelegintoj.
Mi povas aldoni, ke la prelegoj de la du konferencoj aperos en aparta volumo en la dua parto de la jaro. Dum sia restado en Budapeŝto S-ro Braun ne havis sufiĉe da tempo por interkonatiĝi kun la urbo. Li pasigis ses tagojn en la lando, sed krom la konferenco li havis multajn negocajn aferojn. Dum la pritraktoj li regule popularigis ESPERANTON, kie estis ebleco li parolis esperante. Li kontaktiĝis kun multaj hungaraj firmaoj. Post iom da tempo eble li povas raporti sur la paĝoj de MERKATO ankau pri negocaj sukcesoj, kontaktoj.

EKOTRANS kaj IES entute estis sukcecaj aranĝoj kaj mi esperas, ke eble en 1992 ni povos okazigi la 4-an IES. Estus bone se ĝi povus esti memstara aranĝo.

/István Gether

---

**<u>Seminario de IKEF</u>**
**<u>en la Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando, de la 31a de majo ĝis la 2a de junio 1991</u>**

Por plibonigo de personaj rilatoj, por faka diskutado kaj interkompreniĝo, por interŝanĝado de spertoj kaj terminara laboro ni kunvenos en KCE, fine de majo venontjare. La temoj ekzemple estu el inter:

- Problemoj de surmerkatigo
- Evoluo de la komerco kun iamaj socialismaj landoj
- Eŭropa politiko kaj montro de faritaj videofilmoj
- Moderna forstmastrumado
- Konjunkturpolitiko
- Realigo de komerco inter Afriko kaj Eŭropo
- Diskutado pri la celoj de IKEF: Kiel efike plivastigi la uzadon de Esperanto en komerco kaj ekonomio

Kompreneble tiu listo nur entenas ideojn kaj proponojn. Ni firme alvokas vin sin proponi kiel referanton/preleganton.

La tempa paso de la seminario estas planita jene:

| | | |
|---|---|---|
| Vendredo, | 31a de marto 1991 | |
| | posttagmeze: | alveno |
| | vespere: | komuna vespermanĝo, interkona vespero |
| Sabato, | 1a de junio 1991 | |
| | tuttage: | referaĵoj, |
| | vespere: | amuza programo |
| Dimaĉo, | 2a de junio 1991 | |
| | matene: | referaĵoj, komuna vespermanĝo, hejmenveturado |

**Unu-, du- kaj kvarlitajn ĉambrojn estas disponeblaj. La kostoj ankoraŭ ne estas fikseblaj. Tamen ni jam petas viajn antaŭ-aliĝojn pro certigi la ĝustecon de tiu dato kaj kalkuli la grandecon de nia kunveno.**
**Kromaj ideoj kaj proponoj estas bonvenaj.**

**La aliĝilon vi sendu al:**

**S-ro Franz Josef Braun** (Prezidanto kaj Generala Sekretario)
**Hornisgrindestraße 8**
**D(W)-7580 Bühl 16 (FR Germanio)**



... jam de longe konas
la fabrikantojn de la altkvalitaj produktoj
kiuj nur en Svislando ekzistas
kaj kiujn vi ne ankoraŭ trovis

... aŭ elektronikaj eroj
... aŭ vinoj
... aŭ ŝipoj
... aŭ bankaj servoj
... aŭ ... ??? ... ĉu ne ?

***COVALEX S.A.***
Chemin des Voirambeys
CH - 3974 MOLLENS
(Svislando)

Profesie - Fidinde - Diskrete

eldonas komputerprogramojn (IBM aŭ kongruajn)
ŝanĝas, adaptas elektronikajn informojn el unu
al alian sistemon (diskoj - disketoj)

- - - - - - - - - - - - - - - -

**<u>Aliĝilo</u>** (por eltranĉi)

Mi partoprenos en la IKEF-Seminario en la Kultura Centro Esperantista, kiu okazos je la semajnfino de la 31a de majo ĝis la 2a de junio 1991.

Mi venos
[ ] vendrede
[ ] sabate matene

Mi ŝatus tranokti en
[ ] unulita-, [ ] dulita-, [ ] kvarlita ĉambro.

Nomo...................... Antaŭnomo....................

Adreso..........................................

Dato/subskribo..................................

HW/FJB/dk

**Bonvenon al niaj novaj aliĝintoj!**

S-ro Maciej **Piegat**, (IKEF 110), Dantego 1B/48,
PL-01 914 Varsovio, Pollando

S-ro Vu **Hong Tam**, (IKEF 111), 466/57A Le Van Si,
P14 Q3 TP Hochiminh, Vietnam/Vjetnamio

S-ro Jooiĉi **Takahaŝi**, (IKEF 112), 062 Sapporo,
Tojohira-ku, Tojahira 6-10-5-12, Mizuho-hajcu 203, Japanio

---

Peranto por Hispanio

S-ro Pedro Antonio **Macanas Valverde**, (IKEF 105),
[Av. Libertad, 6-2, E-30009 Murcia, España/Hispanio]
prezentas sin kiel IKEF-peranto por Hispanio. /RR

La kasisto proponas akcepti lian kandidatecon. Membroj kiuj malkonsentas bonvolu sendi siajn reagojn al Roland **Rotsaert**.

---

| |
|---|
| Tiu ĉi loko estas la spaco, kie venontfoje povus troviĝi via anonco, la viaj ofertoj. |

/dk

---

Subskribintoj respondecas pri la enhavo de siaj artikoloj. La aperigo entute ne signifas samopinion, nek de la eldonanto, nek de la redaktoro.

---

La rajtoj de represo estas malferma, kondiĉe ke la fonto estas klare indikota. Pruvekzempleroj estas petataj.

---

Reklamtarifoj, en belgaj frankoj: tutpaĝe 1800; ½ paĝo 900; ¼ paĝo 500. 33% rabato por tri-foja sinsekva aperigo de la sama anonco. Membroj ĝenerale ricevas rabaton de 25%.

---

Akiri anoncojn estas ege utila rimedo por subteni nian movadon; eĉ duflanke ekonomie: finance kaj reputacie. /dk